



Esperanto Hamburg

Hamburga Esperanto-Societo r. a.
Esperanto-Verein Hamburg e.V.

Junio / Julio / Aŭgusto (3) 2012

Trairejo al nova epoko

Per novaj traireblaj vagonaroj la Hamburga metro-sistemo eniras la duan jarcenton de sia ekzisto

Fotoj kun afabla permeso de HAMBURGER HOCHBAHN AG

ESPERANTO HAMBURG

ehh

Eldonanto: Hamburga
Esperanto-Societo r. a.
www.esperanto-hamburg.de

Poŝta adreso:
Klaus-Groth-Str. 95
20535 Hamburg
Tel: 0160 / 17 33 980

Konto: GLS-Bank
n-ro: 200 67 16 500
BLZ 430 609 67

Prezidanto:
Jürgen Wulff
Wandsbeker Chaussee 185b
22089 Hamburg
wulff@esperanto-hamburg.de

Redaktoro:
Benno Klehr
Winterhuder Weg 32
22085 Hamburg
Tel: (040) 43188347
klehr@esperanto-hamburg.de

Karaj legantoj,

vi havas antaŭ vi la someran eldonon de nia bulteno. Pasintjare ni sukcese organizis Hamburgan Someron, por homoj survoje al la UK en Kopenhago. Sed ĉi-jare, survoje al Hanojo ni vere ne estas.

Sed la UK 2013 okazos en Rejkjaviko, do eble venontjare, kiam okazos internaciaj ekspozicioj pri arkitekturo kaj ĝardena kulturado en Hamburg, ni povus aranĝi de nove Hamburgan Someron.

Mi ĵus revenis de la *Komuna Dana-Germana-Pola Esperanto-Kongreso* en Berlin. Tie mi renkontis malnovajn amikojn kaj konatiĝis kun novaj. Ĉiam estas belega travivaĵo, viziti kongreson kun partoprenantoj el multaj landoj.

Bonvolu legi pli pri la kongreso en *Berlin* en artikolo sur sekvontaj paĝoj de nia bulteno.

Ni el Hamburg la 1an de Septembro volas vojaĝi al *Bad Zwischenahn*, kie ni renkontiĝos kun esperantistoj el la regiono ĉirkaŭ la malsupra Visurgo kaj Bremen.

Pri la programo de tiu ekskurso vi trovos artikolon sur la sekvontaj paĝoj.

Mi deziras al vi agrablan someron.

Benno Klehr

La kunvenoj de
**Hamburga
Esperanto-Societo**

okazas en la

Kultur-Butiko

**KULTUR
LADEN**

ST. GEORG e.V.

**Alexanderstr. 16
20099 Hamburg**

Sentenco

Multaj Germanoj
kondukas kiel instruistoj,
kiuj daŭre korektas
– aŭ kiel prokuroroj.

Roman Herzog

Redaktofino
de n-ro 4/2012: 15-08-12

Redaktofino
de n-ro 5/2012: 15-10-12

Redaktofino
de n-ro 1/2013: 15-01-13



Metroaj trajnoj 1912 kaj 2012

Fotoj: Vikipedio kaj Hochbahn

La metroo en Hamburg estis konstruita antaŭ tiuj de aliaj urboj en Germanio; nur en Berlin ĝi jam pli frue estis konstruita. La unuaj trajnoj estis mallongaj, la dua generacio jam antaŭ la dua mondmilito similis al la modernaj trajnoj. En tiu ĉi jaro en la hamburgaj metrooj komenciĝas nova epoko. Novaj trajnoj por la linio **U3** havas trajnojn, kie eblos trairi de unu vagono al la alia. Tio donos pli da komforto al la vojaĝantoj kaj ankaŭ pli da sekureco, ĉar ne plu povos okazi, ke iu ne povas fuĝi de agresanto en la vagono. La plej malnovaj trajnoj, kiuj ankoraŭ estas uzataj en la normala trafiko estas de la tipo **DT 2** kaj **DT 3**. La vagonoj de **DT 3** nur estas 2,48 metrojn larĝaj kaj pro tio nur eblas havi du plus unu seĝojn en unu vico, kaj ne

du plus du kiel en la tipo **DT4** kun larĝeco de 2,58m. Sed **DT4** (kun ok vagonoj) estas tro longa (120,56 m) por la malnovaj stacioj de la linio **U3**. La nova tipo **DT5** (kun 9 vagonoj) ne estas pli longa (118,68 m) ol la malnovaj kajoj. Krome la vagonoj eĉ estas 2,60 m larĝaj, do eblas enkonstrui du plus du seĝojn en unu vico – por 33,3% pli da pasaĝeroj. Kvankam la nova **DT5** estas same rapida kiel **DT3**, ĝi veturas malpli laŭte kaj krome ŝparas energion. La nova **DT5** estis konstruita de *Alstom LHB / Bombardier* en *Salzgitter*. Post kelkaj monatoj de testveturado, ankoraŭ en tiu ĉi jaro komenciĝos la regula cirkulado de la unuaj sep trajnoj de la nova tipo.

Laŭ komunikoj de Hamburger Hochbahn esperantigita de Benno Klehr



La plej nova trajno „DT 5“

01.09.2012: Bad Zwischenahn Renkontiĝo kun Grupo *Malsupra Visurgo* Programo de la ekskurso:

- 8:50 renkontiĝo antaŭ Reisezentrum en ĉefstacio
- 11:44 alveno en Bad Zwischenahn:
- Promenado kaj vizito de plenaera muzea ensemblo
- 13:00 transveturo de la lago per ŝipo
- 14:00 - 16:00 manĝado kaj vizitado de fiŝkaptisto Rabben: Angil- kaj fiŝfumajado per mal-novega metodo
- 16:22 buse reen al Bad Zwischenahn:
- Vizito de la preĝejo kaj la simbolo de Bad Zwischenahn "la siluro"
- 17:45 reveturo
- 20:23 alveno en Hamburgo
- Kosto por HES-membroj € 9,- .
- La trinkaĵojn kaj manĝaĵojn pagos ĉiu mem.

Bonvolu aliĝi ĝis la 12a de Aŭgusto 2012 dum klubvespero aŭ ĉe Kerstin Baasch rete Kerstin.Baasch@web.de aŭ 0160 3 46 22 45

Tellergerichte	Preis
Räucherfischsteller: 4 Sorten Räucherfisch mit Krabben & Bratkartoffeln	12,50
Egal: Fischfilet, Matjes, Bismarck, Krabben... mit Bratkartoffeln & Sommersalat	10,50
Forellenfiletteller: Zwei geräucherte Forellenfilet & Bratkartoffeln	8,50 €
Matjesteller: Holländische Matjes, Aalrauchmatjes, Bratkartoffeln, Sommersalat & Hausfrauensöße	8,50 €
Rabben's Brathering: Sauer eingelegter Brathering mit Bratkartoffeln & Sommersalat	7,50 €
Bratwurst: Leckere Wurst mit Bratkartoffeln + Sommersalat & Senf	6,50 €
Frikadelle: Rabben's Fischfrikadelle hergestellt aus Edelfisch mit Kartoffelsalat & Sommersalat	5,50 €



Ĉe fiŝkaptisto Rabben

Foto: A. Gevecke

NIA PROGRAMO

Ĵaŭdaj klubvesperoj: en **Kulturladen St. Georg**
Alexanderstraße 16 • 20099 Hamburg • 19.00 h la membroj
kolektiĝas en la kafejo • 19.30 h vespera prelego laŭ la suba programo

Ĵaŭde de 18.30 h ĝis 19.30 h
Paroliga Rondeto: praktikado
kaj ekzercado de la lingvo

Junio

2 *Karin Bouchain* invitas nin al vegana
varma- malvarma antaŭ-tagmanĝo
al sia loĝejo en Krupunder.

7 Diskussionsrunde:
Mittel- und langfristige Zukunft des
Vereins (Diskutrondo pri la mez- kaj
longtempa estonteco de HES)

14 **Gramatika Somero (GraSo)**
laŭ „ABC-mempraktikilo pri ĉefaj ĉapitroj de
la Esperanta Gramatiko" de Ch. De Vleminck
kaj E. Van Damme. *Benno Klehr*: Participoj 1

21 **Het vergeten Land van Moresnet**
La belga televidfilmo el la jaro 1991 pri la
Esperantolando „Neŭtral Moresnet".
Enloĝantoj raportas pri la tempo,
kiam oni tie parolis Esperanton.
Filmo en la nederlanda lingvo, parte en la
franca, la germana kaj en Esperanto (tiam kun
nederlandaj subtitoloj). (48 min.)

27 Merkredo 18.30 h
Estrarkunveno (publika)

28 *Gerald Roemer*:
**Bicikle tra la nordo de Ŝlesvig-
Holstinio suden** (Vojaĝraporto)

Julio

5 **Gramatika Somero (GraSo)**
Benno Klehr: Participoj 2

25 Merkredo 18.30 h
Estrarkunveno (publika)

12 **GraSo** Korelativoj 1

26 **Gramatika Somero (GraSo)**
Benno Klehr: Kondicionalo

19 **GraSo** Korelativoj 2

Aŭgusto

2 Diskussionsrunde:
Mittel- und langfristige Zukunft des Vereins

29 Merkredo 18.30 h
Estrarkunveno (publika)

9 *Ralph Glomp*:
Kuniganta paroliga Rondo 2

30 Filmo: **Sen limoj kun novaj ebloj**
Pri la aliĝo de Hungara Respubliko al Eŭropa
Unio. 25 minutoj kun posta diskutado.

16 Diskutado pri artikoloj el la gazeto
Le Monde diplomatique
• Survoje al lingva kapitalismo
• Kiam vortoj valoras oron
• Kian kontrolon por la egalrajta komerco?
• Generacio sen estonteco


Septembro

1 (Sabato)
Ekskurso al Bad Zwischenahn
8.50 Renkontiĝo en Hauptbahnhof
(Bonvolu legi artikolon)

23 *Jürgen Wulff*:
INSTAGRAM - la internacia lingvo de la fotoj

12 *Ralph Glomp*: **Falsaj amikoj**
(eraroj pro simileco de vortoj)

Hamburg-Enigmo



Kie en Hamburg troviĝas la apuda kastelo?

(Ĝi estas kopio de turinga mezepoka burgo...)

Foto: Hans Wolters

Profesorino prelegis

La 19an kaj la 20an de Aprilo *Sabine Fiedler* el Leipzig estis gastoj de Hamburga Esperanto-Societo. Dum la Ĵaŭda vespero ŝi prezentis en germanlingva prelego la influon de la angla lingvo al la ĉiutaga germana. Pli ol 20 vizitantoj aŭskultis tiun interesan altkvalitan multmedia prezentadon.



Foto: Privat

Post la prelego la klubanoj povis resti kun ŝi en la kafejo de *Kulturladen* por havi agrablan babiladon kaj diskutadon kun la gastoj.

Vendredon matene *Hannelore* kaj *Benno* renkontis ŝin en la hotelo kaj prezentis la urbon.

La Vendreda prelego de *Sabine Fiedler* temis pri la frazeologio de Esperanto. La aŭskultantoj povis aŭdi kaj vidi ekzemplojn, kiel en la diversaj lingvoj ekzistas similaj manieroj esprimi certajn ideojn. La kluba biblioteko donace ricevis la libron *Ilustrita frazeologio*, kiun ŝi verkis kune kun la ĉeĥa desegnisto *Pavel Rak*.

Ankaŭ la vendreda vespero finiĝis en agrabla rondo en la kulturbutikoj.

Mezepoka sigelilo revenis



Mezepoka Hamburga sigelilo el bronzo troviĝis en la listo de aŭkcioj objektoj en Kolonjo. Temas pri sigelilo, kiu estis uzata por urbaj dokumentoj inter 1300 kaj 1811.

Hamburgaj entreprenoj donacis al la urbo € 450.000 por reaĉeti la sigelilon, kiu malaperis en la ĥaoso post la dua mondmilito. La unuan fojon ĝi aperis en aŭkcio en 1986, sed tiam la urbo ne sukcesis aĉeti tiun gravan historiaĵon.

Foto: Wikicommons

Komuna Dana-Germana-Pola Esperanto-Kongreso 25a ĝis 28a de Majo 2012 en Berlin

teksto kaj fotoj: B.Klehr

De la 25a ĝis la 28a de Majo 2012 en Berlin renkontiĝis 255 personoj el ok landoj dum la komuna kongreso. Multaj ĉeestantoj ne povis kompreni, ke ne troviĝis listo de partoprenantoj kun plenaj nomoj kaj adresoj, sed nur la individuaj nomoj kaj kaŝitaj familiaj nomoj kiel ekzemple **Z***f** por Zamenhof. Tio okazis laŭ tute novaj leĝoj pri la protekto de personaj datumoj.

La kongresejo por la taga programo estis kvartala sociokultura centro *Orangerie*, en kiu ekzistas sufiĉe multaj kunvenejoj. La domo ankaŭ havas bufedon, kie oni povas aĉeti trinkaĵojn kaj manĝaĵojn. Tamen jam la unuan tagon montriĝis, ke la plej granda salono en

Orangerie estis iom malgranda por la inaŭguro, kaj mankis mikrofono. Sed la voĉo de Martin Haase estas sufiĉe forta por fari kompreneblan kaj bonkvalitan prelegon pri **Partneroj en Eŭropo**.

La granda salono por la vesperaj programoj Ĵaŭdon kaj Dimanĉon, la aŭlo de la *Max-Taut-Lernejo*, estis vere juvelo inter la kongressalonoj. En la aŭlo okazis teatraĵoj kaj diversaj koncertoj laŭ diversaj stiloj.

Kantis *Kim Hendriksen* el Danio, *Georgo Handzlik* el Pollando kaj *Stefo (Stephan Schneider)* el Germanio.



Stefo prezentis tute novajn mem verkitajn tekstojn. En la aŭlo ni ankaŭ povis bone aŭdi la prezentantojn, ĉar ekzistis mikrofonoj. Por la korpa bonfarto zorgis *Martin Sawitzki*, kiu dum la tuta vespero

ofertis trinkaĵojn kaj bulkojn kun kolbaso aŭ fromaĝo. Okazis tre interesaj ekskursoj, interalie al Spre-arbaro kun barkovojaĝo tra pitoreska vilaĝo *Lehde* (sorabe *Lědy*) sur multaj insuletoj en interna delto de *Spreo*. (Foto →)

La solenan fermon gvidis *Rudolf Fischer* sola, ĉar la Dana kaj la Pola prezidantoj jam estis forvojaĝintaj. Li dankis al la LKK sub gvido de *Henryk Wenzel* kaj *Felix Zesch*, kaj deziris ĝis revidon en la venonta kongreso en [Nürnberg](#).



Pliilongigo de S-metro-linio ĝis Kaltenkirchen

Estas planite, ŝanĝi la dizelan AKN-linion de *Hamburg-Eidelstedt* al *Kaltenkirchen* (Ŝlesvig-Holstinio) en elektran S-metroon. Same kiel inter *Hamburg-Harburg* kaj *Stade* (Malsupra Saksio) estu uzataj du-sistemaj trajnoj, kiuj en Hamburg uzas elektran relon flanke kaj supran pantografan kontakton ekster la urbo (pro samnivelaj trairejoj); konstrui pontojn kaj tunelojn fariĝus tro multekosta. Estas planita pliilongigo je 21 km kun novaj, pli longaj kaj altaj kajoj.

La konstruado supozeble kostos 50 milionojn da Eŭroj, de kiuj 60% estos pagitaj de la Germana Federacio kaj la reston dividos inter si Hamburg kaj Ŝlesvig-Holstinio, kiel posedantoj.

Per tiu ligo de la norda regiono al la urba trafiksystemo oni supozas ebligi duobligon de la nombro de vojaĝantoj, kiuj sen ŝanĝi povos dum mallonga tempo atingi la centron de Hamburg, aŭ eĉ daŭrigi en la sama trajno ĝis Bergedorf kaj Reinbek (Ŝlesvig-Holstinio) en la orienta regiono. La trajnoj jam nun frekventas en 20 minuta distanco sur la tuta vojo.


La fervojo AKN ĉiukaze devos aĉeti novajn trajnojn por pliaj 50 milionoj, ĉar la uzataj jam aĝas tridek jarojn. Oni supozas, ke la unuaj trajnoj povos uzi la novan linion ekde 2018.

Solvo de Hamburg-Enigmo

La foto montras la solan burgon en Hamburg, Burg Henneberg, kiu estis konstruita 1887 de *Albert Henneberg*, mastro de la bieno Poppenbüttel apud Alster ĉe *Marienhof*. Ĝi estas kopio en la skalo 1:4 de la *Burgo Henneberg* apud *Meiningen* en *Turingio*, kiu apartenis al la grafoj de *Henneberg*.

La mezepoka *Burgo Henneberg* el la jaro 1096 estis detruita en 1525. La kopio en Hamburg servis kiel kunvenejo kaj arkivo de la bieno Marienhof. La aliaj konstruaĵoj de la bieno ne plu ekzistas.

Se vi volas aĉeti ĝin, vi nur bezonas 535.000,00 €.



Vintre en Hamburg

Fotoj supre: Uwe H.
sube: Vikipedio



La ruinoj en Turingio

Germana Luterana Eklezia Kunveno Hamburg 1a ĝis 5a de Majo 2013.

La kristana ligo *KELI* dum tiu kunveno havos Esperanto-informstandon. *Hedwig Fischer*, nova vicprezidentino de *KELI* en Germanio, petis la Hamburganojn, helpi al ŝi organizi tion. Kelkaj Hamburganoj tuj estis pretaj helpi. Pastro *Wolfram Rohloff* el *Zöblitz*, prezidanto de la Germana *KELI*, ne povis veni al Berlin, li momente preparas la *Kristanan Esperanto-Kongreson*, kiu okazos de la 29a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto 2012 en lia hejmurbo en *Ercmontaro*.

Rete ĉe: [KELI](#)

Ankoraŭ eblas aliĝi:

2012-12-27 .. 2013-01-03 (ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo)
11-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Xanten (inter Nijmegen kaj Essen/Ruhr, Germanio)

Samtempe okazos junulara renkontiĝo:
2012-12-27 .. 2013-01-03 (ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo)
4-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj en Xanten

Rete ĉe: [esperantoland](#)

Ĉe-Ellen-ir-tago fariĝis Kun-Werner-ir-tago

Granda surprizo estis por ni, ke al la kluba kafotrinkado venis *Werner Bormann*, kiu dum du jaroj pro korpaj malhelpoj ne povis veni.

Laŭ nia programo devus okazi komuna kafotrinkado en la *kulturbutiko*, sed neniuj antaŭe organizis tion. Ŝajnas, ke niaj membroj atendas, ke la estraro ion faru.

En la 1960aj jaroj *Ellen Eggers* dum la ĉielira tago invitis al sia hejmo kaj pro tio *Thomas Bormann* kreis la nomon **Ĉe-Ellen-ir-tago**. Post kiam ni havis nian propran domon, *Elsbeth Wielgus* organizis la feston. Ek de 2009 *Ralph Glomp* organizis la feston en la kulturbutiko aŭ en kafejo en parko.

Ĉi-jare ni nur renkontiĝis en la kulturbutiko kaj de tie promenis al proksima kafejo. Supozeble pro la malbona vetero por promeni nur venis malmultaj.

Tamen, *Hannelore*, *Jutta* kaj *Benno* kune kun *Werner* promenis al *Viena Kafejo ĉe Steindamm*.

Ni ĝuis bonegan kafon kaj ekscelentajn aŭstrajn bakaĵojn. *Werner* memoris, ke li lastfoje manĝis tian tipe aŭstran krespon kun abrikota marmelado dum kongreso en Beogrado 1973.

Post unu kaj duona horoj kun agrabla babilado ni pagis kaj akompanis *Werner* kun lia rulapogilo al mendita taksio, kaj ankaŭ ni aliaj iris hejmen.



Hannelore ordigas prospektojn

Foto: Klehr

Eŭropa Tago en Norderstedt

La 6an de Majo 2012 okazis internacia festo en la *Kulturwerk*, kie prezentis sin homoj el diversaj landoj, kiuj vivas en *Norderstedt* (norde de Hamburg).

Same kiel pasintjare ankaŭ Hamburga Esperanto-Societo ĉi-jare partoprenis per informstando. Ni prezentis la eblecojn lerni Esperanton perrete aŭ en nia klubo.

Hannelore, *Kerstin* kaj *Benno* ĉeestis inter la 10a kaj 14a horoj, *Peggy* ne povis veni.

Ni parolis kun multaj homoj kaj ankaŭ re-renkontis la aktivulojn de aliaj grupoj de *Rusoj*, *Kroatoj*, *Hungaroj*, *Turkoj*, *Francoj* kaj *Eŭropo-Unio*. Ĉeestis ankaŭ la Eŭropa parlamentanino de *Norderstedt*.

Japana Ĉerizflora Festo

Ĉi-jare de nove okazis la ĉerizflora festo en Hamburg. La 17an de Majo la Japanoj, kiuj loĝas kaj laboras en Hamburg okazigis ĉerizfloran feston en la urbo.

Pasintjare ĝi ne okazis pro la cunamo kaj la atom-akcidento de Fukuŝima. En tiu ĉi jaro la ĝenerala konsulo *Setsuo Kosaka* de Japanio dankis al la Hamburganoj pro la helpo, kiun donis la urbo.



Internacia Ĝardena Ekspozicio IGS 2013

La parkoj de la ekspozicio prezentas parkojn ĉirkaŭ la mondo tra 80 ĝardenoj.

La floraro kaj plantaro „Aŭstralio“ estos unu el kvin ĝardenaj kontinentoj. La kontinentoj estas dividitaj per



bedoj de bluaj iridoj kaj geranioj, kiuj estas transireblaj sur lignaj pontoj.

Plej multajn el la staŭdoj sur la tereno jam estis plantitaj pasintjare, 90 procentoj de la IGS-plantoj jam estas en la tero. Nun nur plu oni plantas en tiuj areoj, kiuj ankoraŭ ne estis pretaj.

La kontinento „Aŭstralio“ simbole prezentu la „Outback“-sovaĝejon en Aŭstralio. La ĝardena Aŭstralio prezentos ruĝan teron.

Tamen Eŭropaj marĉo-gresoj kaj kano-plantoj prezentos



Aŭstralian plantomondon laŭ propra stilo.

Sur la kontinento „Afriko“ kreskas gliediĉioj. La pintaj folioj kaj la fazeolformaj fruktoj memorigas pri arboj en la savano. Ankaŭ la kontinento „Azio“ estos vidindaĵo: Tie la ĝardenistoj plantis grandegajn kornusojn (*Cornus controversa*). Pro la grandaj folioj ili formas bildon de la vegetaraĵo en Tajlando aŭ Mianmaro.

Per la 100 hektarojn granda parkaro la Hamburga kvartalo Wilhelmsburg, sur insulo inter norda kaj suda brako de la rivero Elbe, certe fariĝos pli ŝatinda por la Hamburganoj el la urbocentro, kiuj ofte hezitas „salti“ trans la riveron.

Teksto kaj fotoj: B. Klehr